

"Liluli" – politika alegorio de Romain ROLLAND

Nina KORJENEVSKAJA-GOURIOU

La verkaro de *Romain Rolland* evoluas en la kadro de realisma tradicio. Li estas konata antaŭ ĉio kiel romanverkisto. Sed ankaŭ lia dramverkaro estas granda kaj konsiderinda. En la 90-aj jaroj de la XIX-a jarcento la verkisto parolas unuan fojon pri **groteska komedio**. Ĝi estas "*Liluli*". Ĝi estis verkata en la 1918-a kaj publikigata en la 1919-a jaro.

La temo de "*Liluli*" estas la proksimiĝo de milito. Okazas neevitebla glitado de du popoloj al armita konflikto. "*Liluli*" estas pacema kaj pacifisma verko. *Romain Rolland* akceptas nek militon, nek revolucion teroron, nek aliajn formojn de perforto.

"*Liluli*" staras aparte en la teatro de *Romain Rolland*, ĝi similas al neniu alia lia teatraĵo. Sed ĝi memorigas lian romanon "*Colas Breugnon*" pro siaj folkloraj tradicioj kaj popola lingvo. *Liluli* estas alegoria dramverko. Kio estas alegorio? *Jean Pépin* (1988) skribas, ke alegorio estas retorika figuro, kies senco estas "diri ion alian ol tion, kion vi volas diri". La alia senco de la vorto alegorio estas "operacio permesanta malkovri sub laŭlitera senco alian kaŝitan senco, aŭ, alivorte, alegoria interpreto" ⁽¹⁾. Tiamaniere alegorio estas samtempe **alegoria esprimmaniero kaj alegoria interpreto**.

Uzi alegorion signifas, diri ion anstataŭ io alia, prezenti ideon pere de daŭrigata metaforo (en literaturo), aŭ prezenti abstraktan ideon pere de bildo, figuro kun simbolaj atributoj (en plastikaj artoj). Alegoria bildo estas konkreta figuro **kaŝanta abstraktan senco**. Se iu verko enhavas kaŝitan senco, la aŭtoro devas averti la legantojn aŭ spektantojn. Por tio li uzas diversajn metodojn, eksterajn kaj internajn indikilojn: komentojn de speciala komentanto aŭ de la aŭtoro, logikon de figuroj, organizon de la verko.

Malfacile estas paroli pri "vera" aŭ "malvera" interpreto, des pli ke ofte eblas multaj malsamaj interpretoj de la sama verko. En *Liluli* la eventoj okazas en neprecizigita epoko – sed estas klare, ke temas pri la Unua Mondmilito. En la listo de personoj estas kune homoj kaj alegoriaj figuroj kiel Racio, Libero kaj aliaj. Tie troviĝas ankaŭ "kollektivaj" personoj, kiel ekz. Dikuloj, Maldikuloj, Ĥoro de Intelektuloj ktp. La Francoj iĝis Galipuletoj, la Germanoj Urluberloŝoj; la "amaso de galipuletoj" kaj "amaso de urluberloŝoj" transformiĝas je la fino de la verko en du malamikajn armeojn kaj detruas unu la alian.

En *Liluli* ni vidas du grandajn kontraŭstarantajn partiojn aŭ grupojn: adeptoj de milito kaj ĝiaj maladeptoj. En la unua grupego troviĝas Dikuloj, Maldikuloj, Diplomatoj, Intelektuloj, Ĉenigitaj Cerboj, Mastro-Dio, Granda Ĥano, Granda Derviŝo, Publika Opinio kaj Liluli-Iluzio; en la alia grupo troviĝas Laboristoj kaj Kamparanoj; inter ambaŭ troviĝas "Homamaso", kiu estas hezitema – sed se ĝi ekmovigis, ĝi kapablas mortigi ĉiun, kiu troviĝas sur ĝia vojo.

Ni vidas, ke *Romain Rolland* kritikis antaŭ ĉio du sociajn grupojn: Intelektulojn kaj Ekzeziulojn. En la teatraĵo, la Intelektuloj obeeme kantas ĥore ĉion, kion postulas la Dikuloj. Religio kaj eklezio estas personigitaj en la figuro de Mastro-Dio. Tiu persono ŝanĝas vestaĵojn same kiel opiniojn. Li ĉiam estas kun Dikuloj. Kiel multaj aliaj personoj en la teatraĵo, li tute senkaŝe esprimas siajn ideojn: "Mi ŝatas la ordon, mi respektas la ŝtaton – ĉiujn ŝtatojn. Mia principo: esti ĉiam kun la fortuloj – ili povas esti kiuj ajn, sed ili estas belaj, ili estas bonaj, ili estas ... fortaj! Ĉio estas dirita. Ili ŝanĝiĝas de tempo al tempo; sed mi ŝanĝiĝas kune kun ili aŭ eĉ kvaronhoron antaŭe" ⁽²⁾.

La nomoj de la precipaj personoj estas sencoplenaj. La franca kamparano nomiĝas *Janot*, kio estas diminutivo de *Jan* aŭ *Jean*, plej tipa franca antaŭnomo. La germana kamparano estas *Hansot* – diminutivo de *Hans*, tipa germana antaŭnomo. Tiuj du antaŭnomoj ĝeneraligas du popolojn. La vorto "*gallipoulets*" enhavas nociojn de Gallo kaj de "*poulet*" – do, kokido (koko estas la simbolo de Francio, nur ĉi tie anstataŭ koko rolas kokido...). "*Hurluberloches*" enhavas "*hurluberlu*" – strangulo, senpripensulo, ekstravaganculo, kaj iom ŝanĝitan parton – "*boche*" – malafabla nomo por germanoj. La nomo de *Liluli* estas formita per aliteracio de la vorto "iluzio".

En la verkoj de multaj verkistoj la alegorioj estas kutime tradiciaj dum jarcentoj: virino kun pesilo simbolas ĉiam la Justecon. Sed la verko de *Romain Rolland* estas satireca komedio aŭ eĉ farso kun elementoj de grotesko kaj burlesko. Tial ĉiuj figuroj estas kreitaj laŭ postuloj de tiu ĝenro. Ili ne plu estas **tradiciaj alegorioj, sed parodioj**.

En la komenco de la teatraĵo la aŭtoro montras la paradon de alegoriaj figuroj. Ĉiu figuro estas prezentita kun ironio kaj enhavas neatenditan inversiĝon. Tiuj figuroj estas kreitaj pere de personiĝo (kiel preskaŭ ĉiuj alegoriaj figuroj), sed samtempe pere de ironio, grotesko kaj satiro. La unua persono, kiu komencas la paradon, estas giganto sen kapo, kiu marŝas per grandaj paŝoj, puŝante sin kontraŭ ĉiuj obstakloj. Kiu estas ĝi? Ĝi estas la Vivo. La Amo estas malgranda idioto, kiu ridas aŭ ploras sen iuj ajn videblaj kaŭzoj. La Amo, same kiel la Vivo, tute ne havas romantikan aŭreolon. La figuro kun benditaj okuloj estas la Racio. Ĉiuj tiuj alegorioj prezentas nociojn, ligitajn kun la homa vivo.

Tio estas **metafizika alegorio**, ĉar temas pri tre larĝaj nocioj, prenita el filozofia vidpunkto. Tiuj ĉi alegorioj prezentas filozofiajn doktrinojn pri la senco de la homa vivo, pri amo, pri eblecoj kaj limoj de Racio. Sed ĉiuj nocioj estas satirece inversigitaj. Kvin figuroj – Vivo, Amo, Racio kaj du homoj: Gijo kaj Arguso – estas blindaj aŭ preskaŭ blindaj. Ili ĉiuj starigas la saman demandon: Ĉu eblas, klare vidi en la vivo? Ĉu eblas, ion kompreni?

Tiu ĉi problemo aperas jam en la epigrafo de la teatraĵo, prenita el la romano "*Kola Brunjon*": ... "Kiam li ridas aŭ ploras, necesas antaŭ ĉio, ke li vidu. Vivu duvizaĝa Januso kun la okuloj ĉiam malfermitaj!" La konkludo de la aŭtoro estas senespera: nenion eblas vidi, nenion eblas kompreni en la vivo!

Kiam temas pri Libero, Frateco, Egaleco kaj Paco, ni vidas socian kaj politikan satiron. Tio estas **politikaj alegorioj**. La aŭtoro montras, ke en la nuntempa socio ĉiuj tiuj nocioj estas inversigitaj kaj falsitaj. La Libero, la Egaleco kaj la Frateco iĝas groteskaj figuroj: "Aperas Libero, ĉemizon malfermita sur haroza brusto, fiakristan vapon en la mano" ⁽³⁾. Pere de sia vipo la Libero devigas la sklavojn iri antaŭen. Ĉi tie ni vidas inverson rektan kaj simplan: anstataŭ liberigi homojn, la Libero sklavigas ilin.

La figuro de Paco same estas kreita per neatendita inversiĝo. Paco en la teatraĵo de *Romain Rolland* pli similas al Milito ol al (tradicia) Paco: "Bruo de multnombra militaĉmento, ritmaj pezaj paŝoj. (...) La paŝantoj ĉiuj havas pezajn sakojn kaj armilojn. La unua estas dika viro, fermita en sian uniformon, (...) kun grandega sako, sabro kaj pafilo – ŝvitanta, malfacile spiranta; viŝanta la vizaĝon" ⁽⁴⁾. Sen komentoj fare de Poliŝinelo ni eble ne divenus, ke ĝi estas Paco.

La Paco, same kiel la Libero aŭ la Vivo, estas en la teatraĵo viroj. En "*Liluli*" kelkaj groteskaj kaj malagrablaj figuroj (kiuj personigas tamen la nociojn de virina ĝenro en la franca lingvo) iĝis viroj. La homaj figuroj de tiu dramverko havas simblan funkcion: Ĵano kaj Hanso personigas kamparanojn (francajn kaj germanajn); Altairo kaj Antareso personigas la junan generacion, trompitan per la Iluzio. Tiuj figuroj esprimas abstraktan ideon, resumas la vidpunkton de iu socia tavolo, klaso, profesio, aŭ iun ideon, tendencon.

Ni konstatas, ke *Liluli* estas satireca komedio kun tragika fino. La tragedieca temo – falo de du popoloj al milito kaj morto – aperas en groteska formo. La finalo de la teatraĵo permesas polisemian interpreton: la verko finiĝas per milita katastrofo, dum kiu ĉiuj pereas, neniuj restas viva, eĉ Poliŝinelo mortas. Ni povas vidi kvazaŭ la finon de la homaro – aŭ la finon de la malnova mondo.

La averto de la aŭtoro fakte estas adresita al la popolo. Sed la teatraĵo tamen estas nefacile komprenebla. Ĝi estas verkita de erudito, ni trovas en ĝi aludojn pri historiaj eventoj, pri mitologio, literaturo, biblia historio; same ni trovas kelkajn latinajn esprimojn kaj germanajn vortojn; pro tio ĉio multaj alegorioj restos nekomprenataj de la larĝa publiko. (Ni estas certaj, ke aliflanke ni eĉ ne vidis ĉiujn alegoriojn, sed nur parton de ili!).

Ĉiu leganto aŭ spektanto vidus nur certan parton de la kaŝita senco. Malgraŭ sia bona volo, *Romain Rolland* ne kapablas **aliri** la popolon kaj paroli **kun** la popolo. Ni povas vidi, ke *Liluli* enhavas multajn elementojn de la teatra ĝenro de politika alegorio.

Politika sfero: politika temo, la plej granda evento de tiu epoko – milito. Klare esprimita aŭtoro pozicio: li estas kontraŭ la milito kaj kontraŭ militincitantoj; li kritikis speciale la rolon de ekleziuloj kaj intelektuloj. La verko enhavas analizon de ĉiuj sociaj fortoj antaŭ la komenco de milito; ĝi enhavas multajn aktualaĵojn.

Alegoria sfero: alegoria temo (enhavo): la aŭtoro rakontas la historion de Galipuletoj kaj Hurluberloŝoj, sed la legantoj komprenas, ke temas pri Francoj kaj Germanoj, kiuj proksimiĝas al la Unua Mondmilito – kvankam loko kaj tempo ne estas precizigitaj; figuroj homaj, alegoriaj, "kolektivaj"; Poliŝinelo plenumas la rolon de komentanto: li klarigas la alegoriajn aludojn kaj situaciojn, kaj senmaskigas la intencojn de aliaj personoj; multaj nomoj enhavas kaŝitan sencon; ironio aperas ĉiunivele; ĉio estas inversigita.

La averto de *Romain Rolland* adresiĝas al la popolo. Lia pesimismo montras, ke la alvoko ne estas aŭdita.

Notoj

- (1) PEPIN Jean: "La Tradition de l'allégorie de Philon d'Alexandrie à Dante". *Etudes augustiniennes, série "Antiquité"*, 1988, p. 251-252
- (2) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 66
- (3) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 34
- (4) ROLLAND Romain : "Liluli", Paris, Ollendorf, 1918, p. 32

Adreso de la aŭtoro

Dr. Nina KORĴENEVSKAJA-GOURIOU
Bat. C, L'Espiguette,
rue de Verdun
FR – 13140 Miramas
FRANCIO

<nina.gouriou@wanadoo.fr>
tel. (33)-4-90-58-37-77 (el Francio: 04-90-58-37-77)

Priaŭtoro informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologio kaj slavaj studoj. Ŝi laboris en Baŝkiria Ŝtata Universitato kiel docento ĉe la katedro de la historio pri eksterlanda literaturo kaj tutmonda artkulturo.

D-rino *Korĵenevskaja-Gouriou* estas Orda Profesor(in)o (OProf.) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino kaj instruas okcidentan literaturon de la XX-a jarcento kaj historion de arta kulturo.

De 1993 ŝi loĝas kaj laboras en Francio, kie ŝi instruas la rusan lingvon kaj kulturon.

Scienca elio

Por 2004 kronita "birdoreĝo"

La troglodito (*Troglodytes troglodytes* – germane: "Zaunkönig") estas la elektaĵo de la germana Naturprotekta Asocio (NABU) kiel "la birdo de la jaro 2004". Kvankam la ekzistado de tiu senpretenda, malgranda kaj modest-aspekta birdo kun la laŭta voĉo ne estas aktuale endanĝerigita, ĝi tamen – por ke tio tiel restu – bezonas por sia postvivado, laŭ NABU, striktan konservadon de nedifektita naturmedio. La ruĝbruna mallongvosta "birdoreĝo" estas mallertafluganto – ĝi preferas hopeti. La laŭtsona kantado de la trogloditmasklo povas penetri al niaj oreloj ĝis 90 decibeloj (= internacia mezurunuo de sonintenso) – kaj kun tio atingas la mezurnivelon de eĉ pezkamiona trafiko... (Fotono: "Werra-Rundschau", 2003-10-11)

Iom pri arktaj ursoj

La blankaj ursoj migradas dum sia tuta vivo, ĉiun tagon (escepte kiam ili restas aŭ dormas): de la suda pinto de Gronlando supren laŭlonge de la orienta marbordo, preterire la nordan poluson, transe al Siberio, poste pluen al Alasko. De tie, trans inter la insuloj troviĝantaj antaŭ Kanado, reen al suda Gronlando. Tiajn enormajn distancojn ili ĉiam trapasas de oriento okcidenten – ĉar ili ja migradas kune kun la glacio, sur kies bankizoj ili vojaĝas. La vintron ili travivas dormantaj. Komence de novembro la arktaj ursoj enfosas sin en neĝkavernon kaj iĝas enŝlositaj de neĝamasoj. La propra varmeco de la urso ekvilibriĝas je korpotemperaturo iom super 0° gradoj de Celsio – eĉ la plej akra ŝtormo ĝin ne povas atingi kaj ĝeni. Kiam en marto la urso eliĝas el la dumvintra neĝloĝejo, ĝi estas tiom magra, ke la homoj en la nordaj regionoj longan tempon kredis, ke ekzistas du specioj de blankaj ursoj. (2003-11-04)

Araneo – modelo de perfekteco

Aranea silko estas malpli rompebla ol nilono kaj eĉ ŝtalo, sed la plej granda parto de la – sole en Germanujo! – ĉ. 1000 araneaj specioj tute ne plu interesiĝas (post produktado, uzado kaj forlaso de la kaptoreto) pri tiu ĉi grandega valorajo.

Escepte de la kruc-araneo. Tiu ĉi specio efektivigis la plej aĝan recikladon de la mondo. Anstataŭ lasi simple malkomponiĝi la malnovan hejmon, ĝi, antaŭ la transloĝiĝo, simple formanĝas ĝin. La aranea fadenajo konsistas el fibroinoj, t.e. proteinoj, kiuj estas pliriĉigitaj de la araneo mem. Ĝia metabolo jam duonan horon post vorado de la delikata substanco ree disponigas pri 80 ĝis 90 procentoj de la fibroinoj – por la sekva repletekta agado. La kruc-araneo, do, estas senekzempla modelo de perfekteco. (2003-07-09)